MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

# INFORMILO

5

MAJO 2025 Kol. 478/41

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Enhavo: Poemo Majo, Konkurso Reganto, Choceň, Max Kašparů, Por Amikoj

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## Majo

Ni iras ĉiuj, kun infanoj kaj edzinoj
kaj kun la revo de la antauloj.
Salutas ni la sunon, kiun levis
el tenebroj al kulminoj la preĝoj
de l´ generacioj fidelecaj kaj la laboro.
En rosa herbo dancas niaj idoj,
en rondon ligis ilin frata ĉeno.
Malam´ne estas en la estonteco
kaj en iliaj kantoj sonas ekkompreno
kaj al la patroj ĝi parolas.
Ĉar batalanto, kiu volas venki,
ĉu post plugil´ li iras, ĉu metalon li
martelas, neniam fraton malestimu.

Karel Toman – Monatoj,
en Esperanton tradukis Jaroslav Mráz.



# KONKURSO “LA PLEJ BONA REGANTO DE ESPERANTO”: ALVOKO AL LANDAJ ASOCIOJ KAJ INDIVIDUOJ

La unulingvaj Esperanto-ekzamenoj de Universala Esperanto-Asocio (UEA) laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) – pli konataj kiel la KER-ekzamenoj – estas la plej grava internacia Esperanto-ekzameno. Ĝi estas servo de UEA ofertata de ĝia KER-Ekzamena Centro (KER-EC) kunlabore kun la retejo Edukado.net kaj la Akademio de Esperanto. Ili ekzistas en la niveloj B1, B2, C1 kaj C2 kaj en la kategorioj nur skriba, nur parola aŭ kompleta (skriba + parola). Ĉiuj detaloj troveblas pri venontaj ekzamensesioj ĉe uea.org/gk/1214. Okaze de la sesio dum la 110-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en **Brno, la 1-an de aŭgusto, specife por la nivelo C2** (ĉu surloke, ĉu samtempe rete) **UEA starigas la Konkurson “La plej bona reganto de Esperanto”**. Landaj asocioj kaj individuoj estas alvokataj partopreni! **La celo de la konkurso:** la konkurso celas stimuli aliĝon de reprezentantoj de kiel eble plej diversaj landoj kaj premii la tri ekzameniĝintojn el malsamaj landoj, kiuj unuope ricevis la plej multajn poentojn.

**Kondiĉoj:**

1.Ĉiu konkursanto devas aliĝi al la kompleta C2-ekzameno ĝis maksimume la 1-a de junio 2025 pere de la aliĝformularo ĉe edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj;

2.Ĉiu konkursanto devas esti paginta la kotizon laŭ fakturo sendata de UEA (kotizoj konsulteblas ĉe edukado.net/ekzamenoj/ker/kotizoj);

3. Por esti konkursanto la kandidato devas anonci sin al

ker-ekzamenoj@edukado.net (ne sufiĉas aliĝi al la ekzameno por partopreni en la konkurso. Tiuj, kiuj jam aliĝis al la C2-ekzameno por Brno, povas sin anonci);
4.Ĉiu konkursanto povas partopreni surloke aŭ rete (por retaj ekzameniĝontoj okazos teknika kontrolo kaj la aliĝo validas nur post aprobo);
5.La rezultoj estos kalkulataj surbaze de la akiritaj sumaj poentoj de la skriba kaj parola ekzamenpartoj de la kandidatoj en la C2-nivela ekzameno;
6.Ne estas limo por la nombro de konkursantoj;
7.Rezulto: la rezulto estos anoncita la 15-an de septembro 2025.

**Premioj:** La unua premio estos senpaga aliĝo al la Universala Kongreso (UK) 2026 aŭ aĉetkupono por la Libroservo de UEA je la valoro de 100 EUR. La dua premio estos 50%-a rabato en la aliĝo al la UK 2026 aŭ aĉetkupono por la Libroservo de UEA je la valoro de 75 EUR. La tria premio estos aĉetkupono por la Libroservo de UEA je la valoro de 50 EUR. Aldone ĉiuj premiitoj gajnos: a) bazan membrecon en UEA por la kuranta jaro (se ili ne jam estas individuaj membroj de UEA); b) elektronikan abonon al la revuo Kontakto por la kuranta jaro (se ili ankoraŭ ne abonas aŭ ne aĝas malpli ol 36 jarojn); kaj c) la eblon esti intervjuita por la revuo Esperanto. Kaj ĉiuj ekzameniĝintoj, kiuj sukcesis en ajna nivelo, sendepende de la konkurso. **Donaci por la konkurso:** Donacoj por subteni eventuale nepagipovajn kandidatojn aŭ la ĝeneralan laboron de la KER-ekzamenoj bonvenas al la Konto Eduko de UEA: uea.org/alighoj/donacoj/eduko. Por referenco: kotizo de kompleta ekzameno por la C2-nivelo kostas inter 70 EUR kaj 130 EUR. UEA antaŭdankas ĉiujn kaj ĉiomajn donacojn al la Konto Eduko - donacintoj aperos en la oficiala informilo de la

revuo Esperanto. **Informoj pri la C2-nivela ekzameno kaj senpagaj provtestoj:** Pri la konsisto kaj postuloj de la C2-nivela ekzameno eblas legi informojn ĉi tie: edukado.net/ekzamenoj/ker/specimenoj/c2. Ĉiuj interesatoj povas senpage trapasi provteston pri ambaŭ partoj de la ekzameno, mendebla ĉe edukado.net/ekzamenoj/ker/provekzamenoj.

Mallongigita el la Gazetaraj Komunikoj de UEA

**1.3. – 2. 3. 2025** okazis en la klubejo de Fervojistoj-esperantistoj **en Choceň „lingva ekzercado".** La inviton ekuzis ankaŭ membrinoj de AEH. Per amuza formo ni babilis kaj ekzercis nin pri Esperanto. Ne mankis prelegoj, du el ili estis dediĉitaj al handikapuloj. La unua havis la temon „Nevidantoj kaj fervojo" kaj la dua „Al sinjoro K. E. Macan - unu el la iniciatintoj de Esperanta agado de blindaj esperantistoj. Ĉe nia restado ni ankaŭ vizitis la urbon Choceň.



L. Hakl

## SACERDOTO, PSIKIATRO KAJ ESPERANTISTO MAX KAŠPARŮ RICEVIS LA TITOLON DE ELSTARA DOKTORO

Unu el la ĉefaj aferoj de la solena renkontiĝo de la Ĉeĥa Medicinista Kompanio estis la ceremonia premiado por la titolo „Elstara kuracisto de la regiono Pelhřimov (Ĉeĥio)". La Kompanio organizas la eventojn ĉiujare kun la celo publike

konatigi kuracistojn, kiuj signife kontribuis al la evoluo de medicino en la regiono, aŭ pliriĉigis ĝin per siaj agoj kaj profesiaj scioj.

Por la jaro 2024, la 20-an de novembro, tiu ĉi premio estis aljuĝita al prof. PaedDr. ThDr. kaj MUDr. Jaroslav Maxmilián Kašparů, PhD, dr.h.c., ICEAH, kies eksterordinara profesia kaj persona kariero fariĝis inspiro por la tuta medicinista komunumo. En sia emocia dankparolo profesoro Kašparů rememoris sian komencon en la hospitalo de Pelhřimov antaŭ pli ol kvindek jaroj, kiam li kandidatiĝis por la posteno de psikiatro. Profesoro Kašparů havis admirindan karieron. Post komenca dento-kuracstudado en la Karolo-Universitato Prago (Ĉeĥio), li daŭrigis siajn studojn en ĝenerala medicino en la Komenio-Universitato en Bratislavo (Slovakio). Li poste fariĝis specialisto pri psikiatrio, kie li akiris atestojn por ĝenerala kaj infana kaj adoleska psikiatrio. Li plue vastigis sian edukon en la fako de psikosomatio, fariĝis psikoterapiisto kaj hipnoterapiisto, kie li ricevis ankaŭ PhD-gradon. Liaj sciencaj agadoj ankaŭ inkluzivis pedagogion, etikon kaj teologion, kio estas signoj de lia speciala perspektivo.



Li publikigis pli ol tridek librojn, kelkaj el ili estis tradukitaj en fremdajn lingvojn. Lia literatura verko kombinas medicinajn kaj spiritajn temojn, kiuj reflektas la amplekson de liaj interesoj kaj kapablon ligi diversajn aspektojn de la homa vivo.

Li ankaŭ laboras kiel katolika pastro kaj lia spirita agado estas integra parto de lia persona kaj profesia vivo.

MUDr. Jan Foltin, kiu nomumis profesoron Kašparů por la premio, laŭdis lian kapablon por empatio percepti la problemojn de homoj kaj trovi ne nur profesiajn, sed ankaŭ humanajn konsilojn, menciante ilin en sia ferma parolado. Li laŭdis ankaŭ lian kapablon nomi la aferojn per iliaj trafaj nomoj kaj lian kapablon alparoli aŭskultantojn kun humuro kaj prudento.
„Li estas eminentulo, kiu inspiras kaj riĉigas ne nur nian regionon, sed ankaŭ la pli larĝan medicinistan komunumon," konkludis MUDr. Foltin. La premio „Elstara doktoro de la Regiono de Pelhřimov" ne nur omaĝis la unikan profesian karieron de prof. Kašparů, sed ĝi ankaŭ memorigis al ni, kiel esenca estas la kombinaĵo de kompetenteco, zorgo pri homaro kaj humuro en la ĉiutaga laboro de kuracisto.

De Dio Benu 2/2025

## Por amikoj kaj konatoj - la tempo fluas, amikoj…

Iun tagon, la instruistino petis siajn lernantojn fari liston de la nomoj de siaj samklasanoj sur du malplenaj folioj, lasante spacon post ĉiu nomo. Ŝi poste petis ilin pensi pri la plej bela afero, kiun ili povus diri unu pri la alia kaj noti tion apud la persona nomo. La cerbumado okupis la reston de la leciono kaj ĉe la eliro el la klaso, ĉiu studento transdonis sian plenskribitan paperon. La sekvan sabaton, la instruistino faris liston de la aferoj, por ĉiu studento aparte, kiujn la studentoj skribis unu pri la alia. Lunde ŝi transdonis al ĉiuj la individuan paperon. Post mallonga tempo, la tuta klaso ridetis. "Ĉu vere?" ŝi aŭdis flustron de unu aŭ de alia flanko. "Mi neniam pensis, ke mi celas al iu ajn...." estis oftaj komentoj. Neniu en la klaso plurfoje atentis tiujn listojn de reciprokaj trajtoj kaj opinioj. La instruistino neniam eksciis, ĉu ili ankoraŭ pridiskutis ĝin aŭ ĉu



ili parolis pri tio kun siaj gepatroj... Ne gravis. Ĉi tiu ekzerco servis sian celon. La studentoj estis feliĉaj por si mem kaj unu por la alia samtempe. Kaj la vivo de ĉiuj daŭris. Post kelkaj jaroj, unu el tiuj studentoj estis mortigita en milito kaj la entombigo de ĉi tiu escepta persono, iam la studento estis ĉeestata ankaŭ de lia tiama instruistino. Ŝi neniam antaŭe vidis soldaton en armea ĉerko. Ŝi ne vidis sian studenton dum multaj jaroj, li estis bela plenkreskulo. La preĝejo estis plenplena de liaj amikoj kaj konatoj. Ĉiuj, kiuj amis lin, lastan fojon iris unu post alia al lia ĉerko. La instruistino estis la lasta, kiu omaĝis al la mortinto. Dum ŝi staris tie, unu el la portintoj la ĉerkon alproksimiĝis al ŝi kaj demandis. "Ĉu vi estis la matematika instruistino de Marko?" La instruistino kapjesis. La soldato respondis al tio: "Marek multe parolis pri vi." Post la entombigo, la plej multaj el la iamaj samklasanoj de Marko renkontiĝis. Ankaŭ la gepatroj de Marko estis tie, atendante okazon por paroli kun tiu instruistino.

"Ni volis al vi ion montri ," diris la patro de Marko, eltirinte sian monujon el sia poŝo. "Ili trovis ĉi tion en poŝo de Marko, kiam li estis mortigita. Ni pensis, ke vi eble rekonos ĝin." Li zorge eltiris el la tirkesto du ĉifonajn pecojn de oficeja papero. Unuavide, estis evidente, ke ili estis falditaj kaj disfalditaj sennombrajn fojojn. La instruistino, sen bezoni pli proksime rigardi, sciis, ke ĉi tiuj estas la paperoj, sur kiuj ŝi skribis ĉiujn bonaĵojn kaj kvalitojn, kiujn liaj samklasanoj skribis pri Marko. "Koran dankon pro tio ĉi," diris la panjo de Marko kun tremanta voĉo. “Kiel vi povas vidi, Marek tre

aprezis ĝin." La aliaj ĉeestantaj samklasanoj malrapide kolektiĝis ĉirkaŭe kaj Charlie ridetis timeme kaj poste timeme diris: "Mi ankoraŭ havas mian liston hejme en la supra tirkesto de mia skribotablo." La edzino de Chuck aldonis, "Chuck petis min meti la liston en nian geedziĝalbumon." "Ankaŭ mi havas la mian!" diris Marilin, "en mia taglibro." Tiam Vicky, alia samklasanino, metis la manon en sian poŝon, elprenis sian monujon kaj eltiris sian ĉifonitan liston. Ŝi zorge konservis sian liston. Tiam la instruistino devis sidiĝi estante en larmoj. Ŝi ploris pro Marko. Ŝi ploris por ĉiuj liaj amikoj, kiuj neniam plu revidos lin. Nia ekzisteca ŝarĝo estas tiel forta, ke ni forgesas la fakton, ke la vivo iam finiĝos. Kaj ni ne scias, kiam tiu tago venos.

Tial bonvolu diri al la homoj, kiujn vi amas, ke vi amas ilin. Sciigu al ili, ke vi zorgas pri ili, ke ili estas unikaj kaj gravaj por vi, antaŭ ol estos tro malfrue. Memoru, ke vi rikoltas tion, kion vi semas. Kion vi metas en la vivon de aliaj, revenos en la vian. Havu belan kaj malstreĉan tagon.

La rakonto el la interreto tradukis L.S.

**INFORMILO** – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **+420 721 537 970**
e-mail: aeh@esperanto-aeh.eu interreto: www.esperanto-aeh.eu
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
**IBAN:** CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.